

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №11



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №11 (301)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 80-81.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represo: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2019, №11 (301).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 25 ноября 2019 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Halina Gorecka jubileas	6
Paweł Fischer-Kotowski. Hobio, kiu iĝis profesio: Intervjuo kun Halina Gorecka ..	7
Eventoj	11
Isikawa Tiekō. Japanio: Kongreso malgraŭ tajfuno	12
Kosaka Kiyoyuki. En Tyugoku kaj Sikoku.....	13
Ĉinio: Granda kaj grava kongreso	14
Libuše Hýblová, Miroslav Malovec. Ĉeĥa kongreso: Kial en Brno?.....	17
Aurora Bute. Rumanio: Jara renkontiĝo	19
Bert Schumann. Nova rekordo por Greziljono	20
Paul Quevy Lefevre. Pedagogia staĝo en Kvinpetalo.....	21
Heinz-Wilhelm Sprick. Ne nur biero kaj mustardo	22
Michaela Stegmaier. ĈAR KEKSOJ moĝosas – landlima renkontiĝo.....	23
Paulo Sérgio Viana. Bela festo en San-Karlo.....	25
Paulo Sérgio Viana. La prelegoplena SUMIRE	26
Irina Gonĉarova. Ruslando: Unu leciono pri Esperanto por lernantoj	27
Thierry Spanjaard. Naĝkonkurso sen vestoj	29
Vanja Radovanović. La 30a MKR: Ĉu la lasta aŭ ne?	30
Valentin Melnikov. La 16a VER, sep jarojn post la 15a	31
Rogier Huurman. Klaĉ-Kunveno en la mezo de Holando	32
Aleksander Korĵenkov. Esperanto-gazetoj ne plu aboneblas ĉe UEA.....	32
Irina Gonĉarova. La 14a lingva festivalo okazos en Moskvo	33
La unua Meza-Azia Kunveno.....	34
UK 2020: aliĝu plej avantaĝe	35
Zamenhof-Tagoj en Kaŭno	36
Przemysław Wierzbowski. 20aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj	37
Ronald Schindler. Zamenffesto 2019 en Berlino	37
Nekrologoj	38
Koncize (13 informoj)	39
Tribuno	40
Opinioj de niaj legantoj	41
Grigorij Arosev. <i>La Ondo de Esperanto</i> foriras	44
Roterdamo perdas fidelan voĉtubon.....	45

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Science pri <i>La Ondo</i>	45
Saïoa Escobar. Barcelonaj liberecanoj serĉas kunlaboron per Esperanto	46
La Universala Tago de la Infano	47
Arkivo	48
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en decembro 2019.....	49
Lingvo	50
Věra Barandovská-Frank. IALA kaj Interlingua (2)	51
Kulturo	58
Wolfgang Kirschstein. Ĉu reveno al la tagordo?.....	59
Miĥail Korotkov. Fiasko de imperio: Fabelo.....	62
Floréal Martorell. Bita eldono de <i>Nenifar'</i> de Gijom' Armide	65
<i>Unesko-Kuriero</i> havos kuneldonanton.....	66
<i>Literatura Foiro</i> , 2019, N°301	67
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Bibliografio de Halina Gorecka	68
Ricevitaj gazetoj	77
Valentin Melnikov. Postsomere	77
Mozaiko	78
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.....	79
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	80

Sur la kovropaĝo de la antaŭlasta *Ondo*, ĉi-foje dediĉita al la jubileo de nia eldonanto, estas aŭtuna foto de Aleksej Salomatov (Moskvo). La decembra *Ondo* aperos la 30an de decembro.

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2019: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Librojl/Librojl.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>


Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



Ĉi-novembre jubileas la eldonanto de ĉi tiu gazeto Halina Gorecka, kies supra portreto fine de la 1980aj jaroj paradis sur la “honortabulo” de la projekta firmao, en kiu ŝi laboris.

Halina Gorecka jubileas

Halina Gorecka (ruse: Галина Романовна Горецкая) naskiĝis la 6an de novembro 1959 en Akmolinsk (Акмолинск, Kazaĥa SSR, USSR; poste: Celinograd, Akmola, Astana kaj nun Nur-Sultan – la ĉefurbo de Kazaĥa Respubliko) en la ruslingva familio de ukraino Roman Aleksandroviĉ Goreckij (1934-) kaj polino Nina Petrovna Goreckaja (denaske: Matuŝevskaja; 1938-); frato: Gennadij (1961-).

H. Gorecka lernis en mezlernejo (1967-77) en Celinograd, en 1977 forlasis la naskiĝurbon kaj studentiĝis en la matematika fakultato de Urala Ŝtata Universitato en Sverdlovsk (nun: Jekaterinburgo). En 1982 diplomiĝis kiel matematikisto kaj eklaboris en komputila fako de la projekta instituto Uralgiprotjaĵmaŝ en Sverdlovsk. Ekde 1991 profesie laboras per Esperanto kiel eldonisto, redaktoro kaj korektisto.

En 1986 H. Gorecka edziĝis kun Aleksander Korĵenkov; ilia filo Aleksej (1989-) estas mikrobiologo. En 2001 transloĝiĝis kun la edzo kaj filo al Kaliningrado, kie plu loĝas nun. Socia aktivulino en la sferoj de sanprotekto, defendo de pacientaj rajtoj.

H. Gorecka eklernis Esperanton en oktobro 1979 ĉe la Junulara kulturpalaco de Sverdlovsk; post la kursofino iĝis sekretario de Sverdlovska Esperanto-Klubo. Prelegis kaj artikolis pri Esperanto, vaste instruis la lingvon koresponde, kunorganizis dekojn da esperantistaj renkontiĝoj kaj kongresoj, okazigis vojaĝojn al naciaj kaj internaciaj Esperanto-kongresoj, okupiĝis pri peresperanta turismo. Aktivis en la Esperanto-movado en ĉiuj niveloj (loke, regione, lande, internacie; fake kaj kulture), i.a. kiel sekretario de REA (1992-94), estrarano (1994-97) kaj vicprezidanto (1994-95) de REU, peranto de UEA por Ruslando (1995-), juĝkomisionano de Belartaj Konkursoj de UEA (1993-2002) en la branĉo “Infanlibro de la Jaro”, sekretario de la projekto “La Esperantisto de la Jaro” (1998-2017), de la Internacia Fotokonkurso de *La Ondo de Esperanto* (1998-2010) kaj de la literatura konkurso “Liro” (2000-17).

Oficiala eldonanto de *Ruslanda Esperantisto* (1994-2001) kaj de *La Ondo de Esperanto* (1997-2019); redaktoro de *Ekzakte* (kelkfoje dum 1982-2001), *Informoskop* (1984-2006) kaj *Ruslanda Esperantisto* (1991-2001), redakciano de la almanako *Sezonoj* (1984-89) kaj *La Ondo de Esperanto* (1991-2019); kunfondinto kaj kungvidanto de *Radio Esperanto* (2008-), direktoro de Kolektiva Esperanta Biblioteko (1982-98), Urala Esperanta Arkivo (1992-98) kaj Urala Libro-Servo (1982-2001). Kun sia edzo A. Korĵenkov eldonis 121 librojn en/pri Esperanto, kunaŭtoro de *Esperanto en Ruslando* (2000) kaj *Nia diligenta kolegaro* (2018), (kun)kompilinto de kelkaj bibliografiaj broŝuroj, aŭtoro de pli ol mil artikoloj kaj recenzoj en/pri Esperanto. Laŭreato de la Esperanto-Kulturpremio de Aalen kaj FAME (2010) kaj de OSIEK-premio (2019). Ricevis statueton de la revuo *Spegulo* (2008) kaj diplomon de UEA pri elstara agado (2012).

La teamo de *La Ondo* gratulas la jubileantinon kaj deziras al ŝi sanon kaj multajn pliajn vivojarojn!

Hobio, kiu iĝis profesio

Intervjuo kun Halina Gorecka



Kiam kaj kiel vi eksciis pri Esperanto? Pro kio vi lernis ĝin?

Mi vidis grandan afiŝon pri kurso de Esperanto aŭtunkomence de 1979 en la universitata konstruaĵo en Sverdlovsk (nun Jekaterinburgo), kie mi studis matematikon. Ĉu mi jam sciis, kio estas Esperanto, mi ne plu memoras, sed mi iris al la kurso por havi eblecon korespondi kun eksterlando – certe tio estis menciita kiel unu el la aplikebloj. Kiel lernantino en Celinogrado (nun Nursultano) mi vizitis klubon de internacia amikeco en la urba pionirpalaco, korespondis kun hungara kaj bulgara knabinoj. Ankaŭ en la universitato mi vizitis tian klubon.

Kiu estis la unua libro en Esperanto kiun vi legis?

Vi havas maltrafan respondanton, kiu ne plu memoras pri multaj “unuaj/unuafojaj” aferoj. Tre bildece mi memoras la allogon de la novelaro *Kain kaj Abel* de Sándor Szathmári, kiun ni eĉ voĉe legis kaj citis iujn frazojn populariĝintajn en nia rondo. Kompostante tekstojn por *Baza Literatura Krestomatio*, mi plezure relegis *Groton* de Endre Tóth el lia kolekto *Lappar, la antikristo*, same tre ŝatata. Tiutempe Esperanta libromarkato en Sovetunio estis tre limigita, sed en Uralo formiĝis rondo de esperantistoj, kiujn interesis kulturaj valoroj de la lingvo, estis granda soifo al legado. Iel nature mi ekzorgis pri niaj biblioteko (KEB), libro-servo (ULS) kaj arkivo (UralEA).

Kiuj estas viaj hobiaj krom Esperanto – se oni entute povus diri ke Esperanto estas por vi “hobio”? Mi aŭdis, ke vi gajnis en konkurso pri diktado en la pola lingvo!

Jes, Esperanto estas mia iama hobio kiu iĝis profesio. Pri mia sukceso en la regiona olimpiko pri la pola lingvo ŝatas fanfaroni mia edzo. Dum kelka tempo mi frekventis kurson de la pola, mi ege ŝatis la junan instruistaron kaj la komunikadon en la grupo, legis pole, deklamis poemojn de Szyborska. Mi ŝatas pentroarton kaj vizitas muzeojn, precipe en Moskvo, se mi havas tie almenaŭ duonan tagon libera. Alia ŝato estis kaj plu restas – vojaĝoj – kiu kondukis (per Esperanto!) al



Halina kun la freŝeldonita *Katalogo de KEB*, kiun ŝi kompilis, prelegas en festkunveno okaze de la malfermo de ĝia lokalo, kiun ŝi akiris en sia komunloĝejo (Sverdlovsk, oktobro 1986)

duonprofesia turisma organizado en la 1990aj jaroj. Mi kunlaboris kun “Esperantotur”, organizis vojaĝojn de ĉefe Pollandaj grupoj en Ruslando (interalie, al Bajkalo) kaj Centra Azio, partoprenis en la foiroj de internacia turismo en Bydgoszcz kaj sendis grupojn de Uralo al Altaj Tatroj. Ankaŭ kongresa turismo estas en mia aktivo.

Via persona vivo estas forte interplektita kun la profesia. Kun via edzo jam de jaroj vi entreprenas verkajn kaj eldonajn projektojn en Esperanto. Unuflanke mi ŝatus demandi – simile kiel vian edzon pasintjare – ĉu tio foje ne malhelpas... Aliflanke, vi estas tre bonŝanca kundividi viajn interesojn kun la vivpartnero, pluraj esperantistoj certe povus envii vin.

Komunaj intereso kaj laboro estas plejparte pozitivaĵo. Foje dum semajnfina aŭ festa vespermanĝo amikino de nia filo, kiu kunestis, demandis, ĉu ankaŭ ĉe la tablo ni parolas nur pri la laboro. Nu, tiel okazas, ke ĉiu el ni silente sidas ĉe sia komputilo aŭ skribotablo kaj ne intervenas kun paroloj, kiuj povas malhelpi dum koncentriĝo pri verkado, redaktado aŭ tradukado. Priparoli ideojn kaj planojn ni kutimas dum promeno aŭ ĉe manĝotablo. Tiuj ne estas la solaj temoj, certe. Mi estas informata pri la lastaj eventoj en biatlono, futbalo kaj arta sketado.

Komence de 2017 ĉesis aperi la papera versio de *La Ondo* kaj la magazino transformiĝis en bitgazeton. Nun, antaŭ nelonge, ni eksciis ke eĉ tiu ĉi ne plu aperos. Kiel vi venis al tiu decido?

La decido ĉesigi la paperan eldonadon ne estis facila, ni antaŭvidis ĉagreniĝon de niaj multjaraj abonantoj, kiuj estis kvazaŭ nia familio, multajn ni konas persone, precipe en Pollando, Litovio, Ruslando kaj Germanio. Certan tempon mi sentis vakuon. Pri la kialoj de fermo ankaŭ de la elektronika gazeto estas detala klarigo en la oktobra eldono de LODE, mi ne ripetos ĝin.

**Vi estis eldonanto kaj administranto de *La Ondo de Esperanto* ekde ĝia re-
apero. Kiuj taskoj estis – estas – ligitaj al tiu laboro?**

Mia ĉefa tasko estas administrado de abonoj, kontaktoj kun perantoj, kaj financaj rilatoj kun presejoj kaj poŝtejoj. Krome, mi estas provleganto. Foje ni kune decidas pri (ne)publikigo aŭ pri (ne)reago. Teorie, mi respondecas pri la revuo antaŭ la ŝtato, sed dum pli ol dudek jaroj la ŝtato tute neniel interesiĝis pri nia gazeto.

Kaj kiam *La Ondo* ne plu aperos, kiel vi uzos la gajnitan liberan tempon?

Ha, jen la demando! Ni ja daŭrigos eldoni librojn kaj registri podkastojn, ni intencas evoluigi nian retejon, kiu prenos la rolon de retgazeto. Mi esperas havi pli da tempo por mia socia aktivado, ja mi estas vicprezidanto de Nefro-Liga – Ruslanda neregistara organizaĵo de renmalsanuloj. Cetere, ĝuste mia organiza sperto en la



Halina en unu el la konferencoj de Nefro-Liga (Moskvo, 2018)

Esperanto-movado helpas al mi evoluigi kaj promocii ĝin, krei novajn agaddirektojn kaj gvidi projektojn, ankaŭ mia eldon-redakta faksperto trovis aplikon – mi kompilas, verkas kaj redaktas informilojn kaj libr(et)ojn, prizorgas la retejon de nia asocio.

Ĉu estas iu situacio en la laboro pri la magazino, aŭ eble iu konkreta kajero, kiun vi rememoras aparte pozitive?

Memorinda por mi, sed ne el la enhava vidpunkto, estas la oktobra kajero de 2011, kiun mi provlegis kelkajn tagojn post la operacio, kaj nia filo Aleksej, veninta Moskven por helpi nin, pendolis inter la hospitalo kaj nia luata loĝejo, kie la edzo pretigis ĝin. Pasintjare, kontrolante la bibliografion de Aleksander, mi foliumis ĉiujn jarkolektojn de LODE kaj fiere konstatis, kiom da elstaraj personoj kontribuis al ĝi, kaj kiom da bonegaj materialoj aperis, kies graveco kaj interesveko plu restas!

Vi jam menciis, ke iam vi havis Esperantajn taskojn ekster via familia entrepreno (biblioteko, libroservo ktp). Kiu(j)n el ili vi plenumis plej volonte?

Tre agrabla tasko por mi estis la juĝado pri “Infanlibro de la jaro” en la Belartaj konkursoj de UEA.

Ĉu vi povus malkaŝi kiujn novajn projektojn vi planas por la postOnda erao?

Se temas pri mi persone, mi ŝatus iam pretigi almenaŭ unu broŝuron surbaze de miaj artikoloj en LODE, eble el la historio de Sukcena Lando. Mi daŭrigos kompostadon de recenzoj el la beletra almanako *Sezonoj*. Kion ni kune faros, mi menciis jam supre.

Verŝajne la ĉeso de *La Ondo* fermas gravan etapon en via vivo. Se iu magia tempomaŝino reportus vin en la jaron 1991, ĉu vi irus en la saman direkton?

Prave, tio fermas la plej gravan etapon en la vivo de nia duopo. Sendube ni farus la saman elekton, ja tiam, en 1991, ni longe kaj funde pripensis tiun gravan paŝon.

Kiu estas via plej ŝatata libro en Esperanto?

Iam mi ne respondis al simila demando, sed pri tri libroj, de *La Gazeto*. Mi preferas respondi, kiun libron mi ŝatus, ke oni verku – temas pri mia ŝatata ĝenro tre malofta en Esperantujo – rememoroj de certa “centprocenta” esperantisto. Oni provu diveni kiu(j)n mi aludas.

Kaj revuo? Ni diru, sen menci *La Ondon*, sed kompanse ni enkalkulu ankaŭ tiujn Esperanto-revuojn, kiuj ne plu aperas.

Estas pli facile! *Hungara Vivo* kaj *Literatura Foiro*, nuntempe – *Beletra Almanako*. Sed estis tre agrable foliumadi paĝojn de *El Popola Ĉinio* kun belegaj fotoj!

Intervjuis **Paweł Fischer-Kotowski**

Eventoj



Universala Kongreso: Montrealo 2020!

(jes, kredis viajn okulojn
kaj planu veni jam nun!)

**Dume nur 260 esperantistoj el 38 landoj aliĝis al la 105a
Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos komence de la
venont-jara aŭgusto en Montrealo. Pripensu vian partoprenon
kaj aliĝu. Legu pli detale en la 35a paĝo.**



Japanio: Kongreso malgraŭ tajfuno

Ĉi tiu kongreso povintus esti nekutima, memorinda kongreso, ĉar Japana Esperanto-Instituto (JEI) decidis festi en ĝi sian centjariĝon kun kelkaj specifaj programeroj. Sed la afero efektive iris ege malsame ol ni antaŭvidis.

La tajfuno Hagibis atakis la metropolan regionon de Japanio inkluzive de Saitama kaj faris nian kongreson la plej memorinda kaj neforgesebla en la longa historio de Japanaj Esperanto-Kongresoj! La 12an de oktobro, la unuan tagon de la kongreso, ni planis okazigi kvalifikan Esperanto-ekzamenon de JEI, Inaŭguron kun specialaj prelegoj rilate al la centjara jubileo de JEI, Artan Vesperon, ktp. Sed ĉiu programero en la tago estis nuligita; avertis jam de la antaŭa tago la Meteologia Subministerio, ke homoj ne ekstereniru, kaj jam posttagmeze komenciĝis malfunkciado de trajnoj. LKK decidis nuligi la unuan tagon de la kongreso posttagmeze de la 11a, kaj anoncis rete, eĉ telefone al 40 aliĝintoj sen interreto.

Ankaŭ sekvatage, la 13an de oktobro, daŭris malfunkciado de trajnoj, sed la kongresejo malfermiĝis je la 10a, kaj iom post iom venis partoprenantoj. Ankaŭ tiutage ne okazis multaj programeroj antaŭe planitaj, ekzemple publika simpozio, enkonduka Esperanto-kurso kaj publikaj prelegoj. Okazis en la salono prezento de libroj. Vespere okazis la bankedo kun 70 partoprenantoj, kaj tie kantis Mikaelo Bronŝtejn, kiu maltrafis la okazon prezenti siajn kantojn en la koncerto de Arta Vespero.

Nur la 14an la kongreso okazis en normala formo, sed ankoraŭ ne laŭplane. Kelkaj kunsidoj ne okazis pro la foresto de la prizorgantoj. Rimarkindaj estis jenaj du prelegoj; tiu de Bronŝtejn "Artoj elvivi en la postsovetia Rusio" kaj la alia de Sasaki Teruhiro pri lia nova instrumentado de la japana lingvo en ĉina universitato. Okazis kutimaj kunsidoj kiel la ĝenerala kunsido de JEI, kunsido pri Azia agado, ktp.

Posttagmeze antaŭ la fermo, ni havis la specifan programeron por la 100-jara jubileo de JEI, kiu ne okazis en la unua tago. La prezidanto de JEI Suzuki Keiichiro parolis pri la 100-jaraj paŝoj de JEI. Sekvis la prelego de prof. Gotoo Hitosi “Kion Ossaka Kenji lasis al ni”. La unua tutlanda Esperanto-organizo en Japanio fondiĝis en 1906, sed post iom da fiasko de la organizo, s-ro Ossaka kun aliaj samideanoj fondis la nunan JEI-n en la jaro 1919a kaj gvidis la Esperanto-movadon dum longa tempo. Pro tio ni nomas lin la patro de la japana Esperanto-movado.

La kongresa temo estis “La mondon malfermas Esperanto – interkompreno kaj pluen”. Ni LKK-anoj volis substreki la parton “kaj pluen”. En la simpozio, kiu povus trakti lingvoproblemojn en internaciaj agadgrupoj, ni intencis tuŝi la demandon: Kion faru ne “por” sed “per” Esperanto? Krom tio, ni organizis specialan programeron celante al junuloj ŝatantaj la komputilan ludon “Kotonoha Amrilato”, sed ĝi ankaŭ nuliĝis pro la tajfuno. Ne eblis renkonti tiajn junulojn en Esperanto-aranĝo, kio multe senkuraĝigis junajn LKK-anojn.

Ni vere bedaŭras, ke ĉiuj publikaj programeroj estis nuligitaj. Ni perdis grandajn ŝancojn konigi Esperanton al lokanoj. Sed malgraŭ tiaj malfacilaĵoj efektive partoprenis 235 homoj el 459 aliĝintoj. Inter ili 31 homoj venis el eksterlando. Mi kore dankas pro ilia kuraĝo kaj pro la laboro de LKK-anoj en tia nekutima situacio.

Isikawa Tiekō

En Tyugoku kaj Sikoku

La 20a Esperanto-Kongreso de Tyugoku kaj Sikoku okazis la 26-27an de oktobro en la urbeto Kotohira, gubernio Kagawa, kiu situas sur la insulo Sikoku. “Tyugoku kaj Sikoku” estas la regiono inter Kansai (Osaka, Kyoto ktp.) kaj Kyushu (Fukuoka, Nagasaki ktp.). La plej granda kaj fama urbo en tiu ĉi regiono estas Hiroshima.

Partoprenis en ĝi 63 homoj. 15 partoprenantoj venis el ekster la regiono; kaj ses el ili el Pollando, Francio, Hispanio, Belgio, Tajvano kaj Koreio.

En la unua tago okazis du fakkunsidoj en hotelo. Unu estis la raporto pri la 104a UK en Finnlando; la raportanto estis prof. Nagamachi. Alia fakkunsido nomiĝis “Ni parolu libere kun eksterlandaj esperantistoj”; la respondeculo estis Cyril R. Vergnaud, franco loĝanta nun en Tajvano.

En la dua tago la kongreso okazis en la urba kulturdomo kun prelegoj kaj du fakkunsidoj. Unue prelegis Cyril R. Vergnaud pri “kulturaj malsamecoj”. Li montris multajn fotojn kaj tabelojn uzante Power Point. Miyoshi Etsuo, Honora Membro de EEU, rakontis pri sia vivo esperantista. La tria preleganto estis la verkistino Sako-guchi, kiu parolis pri la esperantista aktoro Sasaki Takamaru.

Poste okazis du fakkunsidoj: “Japana kamelio ligas popolojn en la mondo” de s-ro Yano kaj “Pri mia Esperanta traduko de la libro *Krabŝipo*” de s-ino Tsushima. *Krabŝipo* estas la fama novelo de la proleta aŭtoro Kobayashi Takiji.

Kosaka Kiyoyuki

Ĉinio: Granda kaj grava kongreso

La 8-10an de novembro la 13a Ĉina Kongreso de Esperanto kun la ĉeftemo “Origina aspiro kaj misio de ĉinaj esperantistoj” okazis en la urbo Shaoxing, Zhejiang-provinco en sudorienta Ĉinio. En la jaro de la 70a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj 70-jariĝo de la Ĉina Internacia Eldona Grupo (ĈIEG), tegmenta organizo de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), ĉ. 300 personoj partoprenis en la kongreso, okazinta en la hejmloko de Hujucz, fondinto de ĈEL – la nombro de la partoprenantoj estis la plej granda en la historio de la ĉinaj Esperanto-kongresoj.

La 9an de novembro solene inaŭguriĝis la kongreso. Post la videa salutparolado de la prezidanto de UEA Duncan Charters, Chen Haosu, honora konsiliano de ĈEL, alvokis, ke la ĉinaj esperantistoj ne forgesu la originan aspiron, firme sekvu la mision kaj klopodu krei novan brilon de la ĉina Esperanta movado. Fang Zhenhui, vicprezidanto de ĈIEG kaj la unua vicprezidanto de ĈEL, diris, ke Ĉinio pli kaj pli multe ludas sian rolon en la mondo, kaj havas pli kaj pli intimajn rilatojn kun la mondo; en tiu situacio la ĉinaj esperantistoj devas kunlabori por krei pli belan estontecon de ĉina Esperanto-movado. Parolis ankaŭ Pan Lifeng, reprezentanto de loka registaro, kaj aliaj homoj.



Wang Ruixiang, vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de ĈEL, raportis pri la agado de la ligo por 2018-19. Inter la atingoj, li menciis Zaozhuang-an Universitaton, kiu varbis 48 studentojn por la Esperanto-fako, kie pluraj spertuloj servas kiel instruistoj. La instruista, komerca, fervojista kaj medicina sekcioj de ĈEL respektive donis siajn kontribuojn. Estis menciitaj ankaŭ diskonigo de Ĉinio en esperantistaj kongresoj, la ekspozicio “70 jaroj – Ĉina Esperanta Movado kaj la Mondo”, kaj novaj Esperantaj libroj, kiel *Sieĝata fortikaĵo*, *200 antikvaj poemoj de Ĉinio*, *Ŝlosilaj vortoj por kompreni Ĉinion*, *Strangaĵoj de Liaozhai* kaj *Libro de Ŝanĝiĝoj*. Fine Chen Shi, vicprezidanto de ĈEL, vicĉefredaktoro de ĈIEG kaj estro de *El Popola Ĉinio* (EPĈ), prezentis la liston de la premiitaj aktivuloj, kiuj faris kontribuon por la Esperanto-movado en diversaj lokoj de Ĉinio.

Post la inaŭguro komenciĝis laborprogramo, kiu inkluzivis forumojn kaj grupajn diskutojn. La fervojista kaj la komerca sekcioj okazigis komunan diskuton, en kiu la sekciestroj Xiao Ke kaj Zhang Changsheng laŭvice prezidis la diskutadon. Ili respektive faris resumon de la diskutado kaj poste raportis en la ferma ceremonio de la kongreso. Samtempe okazis la kunvenoj de la instruistoj, medicinistoj kaj gejunuloj.

Sekvis du forumoj. En la forumo “Origina aspiro kaj misio de ĉinaj esperantistoj”, Hu Menggu, nepino de Hujucz, emocie rememoris la rilaton de Hujucz kun Esperanto kaj liajn kontribuojn al la Esperanto-movado. Li aspiris antaŭenpuŝi kaj popularigi la internacian lingvon en Ĉinio kaj per la lingvo liberigi, diskonigi kaj konstrui la landon. Tiun mision daŭre plenumas nunaj ĉinaj esperantistoj. La veterana esperantisto Zhu Mingyi rakontis pri siaj renkontiĝoj kun Hujucz. La prelegoj de Yuan Ailin (prezidanto de Chongqing-a Esperanto-Asocio), Yu Tao, Cao Shengqiang kaj Huang Yinbao kuraĝigis la ĉeestantojn pli sindediĉi al la Esperanto-movado.

La forumo “Disvastigo de Esperanto en la epoko de media integriĝo” altiris centon da aŭskultantoj. Xiao Henggang el Ĉina Radio Internacia (ĈRI) rakontis pri disvastigo de Esperanto en la retejoj de ĈRI. Zhao Wenqi, uzante datumojn, prelegis pri vizitoj, legoj, klakoj, ŝatoj kaj aliaj nombroj en la retejoj WeChat, Fejsbuko kaj aliaj.

En julio EPĈ organizis deklamkonkurson, en kiu kandidatoj registris siajn voĉojn kaj sendis ilin al la redakcio por voĉdonado inter legantoj. En la kongreso la gajnintoj ricevis premiojn. La 13-jara knabo Han Yang iĝis la plej juna premiito.

La 10an de novembro okazis la ferma ceremonio, kiun prezidis Chen Ji, direktoro de la Esperanto-sekcio de *El Popola Ĉinio*. Wang Disheng, estro de la medicina sekcio de ĈEL, resumis la diskutojn de la membroj de la sekcio kaj rakontis pri ĝia laborplano por la du venontaj jaroj: praktikado de Esperanto en medicino kaj diskonigo de la tradicia ĉina medicino en la mondo per Esperanto.

Wei Yubin, direktoro de la elementa lernejo Baiyangshujie en la urbo Taiyuan (provinco Shanxi) resumis la laboron de la instruista sekcio kaj ĝiajn atingojn en la pasintaj du jaroj. Zhang Changsheng parolis pri la kunveno de la komerca sekcio.

Xiao Ke raportis nome de la fervojista sekcio kaj proponis eldoni albumon pri la historio de ĉina fervojo, pri kio certe interesiĝos esperantistoj de diversaj landoj.

Zhang Yue, studentino de la Esperanto-fako en Zaozhuang-a Universitato, reprezentante la ĉinan Esperanto-junularon, respondis tri demandojn: kulturo de Esperanto, tradukado, kaj bezono de la Esperanto-lernado.

Post la paroloj de la reprezentantoj de la loka registaro kaj Esperanto-asocio, Zhu Chunlan kaj Qiu Xirong, sinjorino Chen Shi faris finan resumon kaj diskonigis gravajn informojn pri la estontaj agadoj de ĈEL, interalie:

- Fondi la federacion de E-asocioj en la landoj laŭlonge de “La Zono kaj Vojo”;
- Pozitive partopreni en la translokado de la biblioteko de UEA;
- Kandidatiĝi por gastigo de la 107a Universala Kongreso en 2022.

Post la ferma ceremonio la kongresanoj veturis al la urbeto Fenghui kaj inaŭguris la Kulturdomon de Esperanto en la iama loĝejo de Hujucz por omaĝi la iniciatinton de ĈEL. En la inaŭguro parolis Hu Menggu kaj Xu Huabiao, urbestro de Fenghui. Zhu Mingyi donacis librojn al la Kulturdomo de Esperanto. Poste la kongresanoj eniris en la loĝejon kaj vizitis la bild-ekspozicion pri kontribuoj de Hujucz al Esperanto.

Laŭ *El Popola Ĉinio*

Statuo de Hujucz staras antaŭ lia iama domo.



Ĉeĥa kongreso: Kial en Brno?

Unue, iom da historio

Inter la 17a ĝis la 20a de oktobro 2019 okazis en Brno kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Esperanto havas en Ĉeĥio kaj en Brno longan historion. Jam en 1890 aperis la unua lernolibro de Esperanto por ĉeĥoj, kiun verkis 18jara F. V. Lorenc, sed la veran movadon startigis la dua lernolibro en 1900, kiun verkis Theodor Ĉejka.

La unua klubo, kiu atingis oficialan aprobon, estis en Brno en 1901, sekvis Prago en 1902. En 1907 fondiĝis Bohema Unio Esperantista (unuigis lokajn klubojn en Bohemio kaj Moravio), en 1908 individuoj asociiĝis en Bohema Asocio Esperantista. Ankaŭ la germanlingvaj esperantistoj en Ĉeĥio en 1913 kreis sian landan asocion.

Post la milito la ĉeĥlingvaj kaj germanlingvaj esperantistoj denove asociiĝis memstare. En 1921 dum la universala kongreso en Prago fondiĝis SAT (kun aŭspicio de Albert Einstein) kaj unuafoje kongresis blinduloj. La plej grava esperantista atingo en Ĉeĥoslovakio inter la du mondmilitoj estis elsendado de *Verda Stacio* en Brno, kiu post la milito transiris al Prago.

Jam en 1946 restariĝis la tutlanda asocio kun la organo *Esperantista*, en 1948 komencis aperi la gazeto *Esperanto-Servo*, propagandanta la politikon de komunistoj. En tutlanda asocia kongreso 1950 en Brno kolektiĝis pli ol mil kongresanoj. Tiom pli surprizis informo en 1952, ke ambaŭ gazetoj ĉesas aperi, silentiĝis *Verda Stacio*, kaj en septembro sepdeko da funkciuloj estis dum multaj horoj persvadataj “libervole” likvidi sian asocion.

La movadon savis Rudolf Burda el Plzeň, kiu komencis eldonadi la stencilitan bultenon *Pacdefendanto* kaj fondis Mondpacan Esperanto-Movadon. Unuopaj kluboj kaj rondetoj komencis aktivi ĉe kulturdomoj. Grava estis agado de la esperantista junularo kaj ties someraj tendaroj. Tiamaj stencilitaj bultenoj estas por ni gravaj informfontoj pri la tiama movado ĝis 1959, kiam estis permesita dekmembra Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kun sia *Informilo* (ĝis 1969 aperis 30 numeroj). En 1969 estis en Brno restarigita Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La fondkunveno de ĈEA okazis tiam en la kulturdomo Besední ekde la 29a ĝis la 31a de marto kaj partoprenis ĝin 400 esperantistoj.

La longa historio de Esperanto en Brno estis kaŭzo por elekto de Brno por la 17a kongreso de ĈEA, okazinta 50 jarojn post la fondkunveno. La kongreson partoprenis preskaŭ cent geesperantistoj ne nur el Ĉeĥio, sed el pliaj ok landoj. Ĝi okazis sub la aŭspicio de la urbestro de Brno d-ino Markéta Vaňková.

Pri la nuna kongreso, okazinta la 17-20an de oktobro

Kadre de la kongreso oni sukcesis preparoli la ekspozicion pri Esperanto en Ĉeĥio, kiun pretigis la loka klubo kaj kiu estis instalita en la biblioteko Mahen dum la tuta oktobro. En la biblioteko okazis ankaŭ lanĉo de la ĉeĥa versio de la libro



Brno: Reinhard Fössmeier, Martin Stuppniĝ kaj Petro Chrdle (Foto: Pavol Kaščák)

de Martin Stuppniĝ *Home en senhomeco* kun subskribado kaj interparolado kun la aŭtoro por vasta publiko, kiu estis sukcesa. Krom ekskursaj programoj okazis multaj prelegoj.

La komenco estis ĵaŭde per du prelegoj de Jozef Reinvarť el Slovakio, speciale pri la Propono de SKEF kaj SKEJ por listigo de “Lingvo Esperanto – portilo de la slovaka kaj Esperanta kulturoj” en la liston de nemateria kultura heredaĵo de Slovakio. Vendrede la partoprenantoj povis ekskursi al Slavkov (okazejo de la batalo de tri imperiestroj) aŭ sekvi lingvokurson de Magdaléna Feifičová.

La kongreso estis por ni jubilea, do granda spertulo pri historio de E-movado en Ĉeĥio, Miroslav Malovec prelegis pri la historio de Esperanto-movado en la Ĉeĥa Respubliko kaj ankaŭ preparis dulingvan libron *ĈEA en la jaroj 1969-2019 – Český esperantský svaz v letech 1969-2019*, kiun ĈEA eldonis okaze de la kongreso.

Ĝi estas demonstra versio de la 82-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



Ke la deziro konatiĝi kun la enhavo de *La Ondo de Esperanto* povas esti pli forta ol la tento ripozi, montras la foto kun Fritz Hilpert, unue publikigita en la junia eldono de *La Ondo*, kiu havis la jubilean numeron – №200.

Opinioj de niaj legantoj

Responde al la informo pri la baldaŭa ĉeso de *La Ondo de Esperanto* publikigita en la oktobra eldono, venis pluraj mesaĝoj. Parton de ili ni aperigas ĉi-sube laŭ la alfabetita familinoma ordo. Ni aldonas ankaŭ du priajn komentojn, kiu aperis en *Libera Folio* kaj HeKo.

Mi ege bedaŭras pro la baldaŭa malapero de “La Ondo”. Ĝi estis grava parto de Esperanto-vivo – mia, tut-ruslanda, eĉ tutmonda. La revuo mem estis ĉiam bonkvalite farita kaj interese. Tamen mi komprenas la kialon. Certe, necesas gardi la vidkapblon kaj ŝpari tion, kio restis. Resaniĝon al vi, al viaj okuloj, kara Aleksander – almenaŭ tiom, kiom eblas. Sed ĉu vere ne eblas preni iun personon, laboreman kaj fidelan al la ideo, kiu farus ĉeekranan laboron anstataŭ vi? Estas tre bedaŭrinde.

Ikar A. Akimenko (Ruslando)

Plej verŝajne la “Ondo” estas tiu revuo kiu plej liveris kontraŭ malpli da mono. Mi havas nur vortojn de danko kaj admiro por la redakta skipo, modela multflanke, inkluzive de profesiaj kaj amikemaj rilatoj kun ties kunlaborantoj. La perdo enormas. Bonŝance restas al ni la riĉa arĥivo daŭre explorebla kaj ĝuebla. Respektante vian decidon, mi deziras al la Onda paro sukcesojn en iliaj ontaj projektoj.

Xavi Alcalde (Katalunio, Hispanio)

Dankante pro la antaŭantaŭlasta “Ondo”, mi kiel leganto/abonanto el Magdeburgo, volas esprimi mian senliman admiron al via giganta longjara konstanta laboregado por kaj per Esperanto!!! Mi deziras al vi ambaŭ ĉion plej bonan kaj al vi, Aleksander, ĉefe bonan sanon, reboniĝon de via vidkapablo! Atentu pri via sano, ĝi estas la plej valora, kion ni havas!

Do, fartu bone, vi ambaŭ.

Dieter Dungert (Germanio)

Eĉ se mi bedaŭras la novaĵon, mi ne povas ne agnoski tion, ke tia estas la vivo. Kaj danki vian netakseblan laboron.

Luís Ladeira (Portugaliao)

Kvankam mi jam sciis, ke ĉi tiu jaro estos la lasta de la OdE, la kruda sciigo kun la foto de vi du kun la libroj laste eldonitaj tre profunde min tuŝis, same kiel la sciigo pri malboniĝo de vidkapablo. Mi ĉiam aprezis vian multflankan agadon, kaj LOdE estis ĉiam mia preferata informa revuo, tiel plena de movado diversloka kaj kulturo respekta al ĉiuj. Kun ĝia fermiĝo fermiĝas historia periodo.

Mi estis tre proksima al vi kiam Halina misfartis, mi volonte iom helpetis en la redaktado de NDK (tro malavare min vi listigis en la redaktan komitaton), mi estos daŭre proksima en via agado venonta. Mi ĝojas, ke mi ekkonis Halinan en Lillo, kun Aleksandro eble mi apenaŭ interkruciĝis, mi ne konscias pri tio.

Espereble ni ankoraŭ renkontiĝos, vi estas ankoraŭ junaj, mi jam delonge ne plu (NDK perfidas mian aĝon...).

Kun granda, tre granda danko pro ĉio, kion vi faris “en la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas”.

Carlo Minnaja (Italio)

Kun multe da bedaŭro mi legis, ke “La Ondo” baldaŭ ĉesos aperi. Tre trista novaĵo. Via gazeto ja estas firma ero en la Esperanto-kulturo. Sed mi komprenas vian decidon. La aĝo kaj la sano estas superfortoj, kiuj decidis pri ĉio.

Mi deziras al vi ambaŭ ĉion bonan, kaj esperas, ke vi ne malaperos el la movado.

Paul Peeraerts (Belgio)

Mi tre bedaŭras pro la novaĵo. Mi estas fiera, ĉar iam mi korespondadis kaj kunlaboris kun vi. Mi dezirus ke vi trovu kunlaborantojn en Rusio por daŭrigi vian laboron... kaj sukceson.

Roberto Sartor (Argentino)

Koran dankon pro via senlaca laboro dum la multaj pasintaj jaroj! Mi tre bedaŭras, ke vi devas ĉesigi la eldonadon de LOdE. Sed mi ankaŭ bone komprenas, ke tiu senĉesa laboro lacigas viajn okulojn, kaj ne estas bona por la sanstato, se daŭrus ĉiame. Do, mi dankas al vi kaj deziras al vi ĉion bonan, iom pli da ripozo kaj pliboniĝo de via okula vidpovo kaj via sanstato entute. Provu malgraŭ ĉiuj eblaj malfacilaĵoj tamen ĝui la vivon kaj fartu bone!

Heinz-Wilhelm Sprick (Germanio)

La informo pri la ĉeso iom tristigas min – ja via magazino estis daŭra ligo kun via mondoparto. Sed gratulon pro tio, ke vi tiel longe faris la laboron. La okuloj de ALKo ĝuu iom da ripozo.

Trevor Steele (Aŭstralio)

Mi tre bedaŭras, ke tiu elstara revuo ĉesos plu aperadi. Ke ne troviĝas daŭriganto montras, kiel eksterordinara homo vi estas kune kun Halina.

Lenke Szász (Rumanio)

Jubileo? Stranga jubileo... jubileo kun larmoj...

Simple: eternan dankon por la gigantega, mirakla tasko, kiun vi faris sur ĉiaj kampoj.

Kun granda malĝojo kaj deziro de kvieta ripozo plej meritita

Jean-Luc Tortel (Francio)

Mi ja bedaŭras tiun fakton sed komprenas vian decidon kaj dankas vin du pro via enorma, daŭra kontribuado informa, eduka kaj kultura. Mi memoras ke antaŭ kelkaj monatoj vi menciis en iu mesaĝo, ke vi sukcesis pensiigi, kio ja estas trankviliga koncerne vian materian estontumon.

José Antonio Vergara (Ĉilio)

Kun granda konsterno mi ricevis la informon, ke “La Ondo de Esperanto” ĉesos aperi. Tio estas por mi vera malĝojo. “La Ondo” fariĝis parto de miaj regulaj legaĵoj. Ĝi certe estas unu el la plej riĉenhavaj, modelaj revuoj pri nia movado, pri nia kulturo. Mi komprenas, ke sanproblemoj kaj laceco malebligas al la nunaj administranto kaj redaktanto daŭrigon de tia giganta laboro. Sed mi apenaŭ povas kredi, ke ne troviĝas en la mondo skipo, kiu povus alpreni la taskon! Ĉar fakte temas pri granda perdo! Eĉ se provizore oni malgrandigus la revuon ĝis restabiliĝo, tamen oni devus konservi tian gravegan informilon!

Ĉu vere nia movado estas nuntempe tiel malforta, ke ne aperos anstataŭantoj? Aŭ la brilo de la nunaj prizorgantoj de “La Ondo de Esperanto” timigas eventualajn kandidatojn?... Mi ankoraŭ kovas en mia nesto la esperon, ke nia kara “Ondo” ne malaperos!”

Paulo Sérgio Viana (Brazilo)

Kvankam jam la 4an de oktobro mi legis en via mesaĝo, ke vi ne plu eldonos tiun mirindan revuon post decembro, mi nur hieraŭ lernis la detalojn de la kialo de tiu decido. Mi bedaŭras la malaperon de tiu komunikilo, sed mi komprenas viajn kialojn.

Mi certas, ke vi, Alko, malgraŭ viaj vidmalfacilaĵoj, estos daŭre aktiva intelektulo kaj esperantisto. Aliflanke, vi bezonas kaj meritas raciigi vian tempouzon. Mi tamen esperas, ke ni daŭrigos nian agrablan kaj taŭgan interparoladon.

Pedro Zurita (Hispanio)

Ni dankas ĉiujn, kiuj skribis al ni, inkluzive de tiuj kies vortoj ne estas publikigitaj ĉi tie, kaj tiujn, kiuj reagis en la reto. Pri la estonteco de nia ĵurnalista agado vi povos legi en la decembra eldono de *La Ondo de Esperanto*, kiu aperos la 30an de decembro.

Halina, Aleksander



La Ondo de Esperanto foriras

<...>

La Ondo de Esperanto <...> nek estis nek estas la sola Esperanto-periodaĵo en Rusio, kaj ĝi ne estis ideala. *La Ondo* eĉ ne estis objektiva, ja ĉiam prezentanta la mondovidon de ties redakcio – tamen ĉu povus esti alie? Sed sendube ĝi estis kaj estas profesia eldonaĵo, kiu ĉiam kreis solidan bildon pri la Esperanto-movado en Rusio, en lando kiu pro la historiaj cirkonstancoj ĉiam havas apartan (ne legu "plej gravan", legu laŭvorte "apartan") rolon en la historio de la Esperanto-movado. La ceteraj periodaĵoj en la sama lando vole-nevole ĉiam havis antaŭ la okuloj ĝuste *La Ondon*, kaj kreis konceptojn de siaj eldonaĵoj surbaze de la impresoj pri *La Ondo* – kio estis en ĝi bona, kio estis malbona.

Mi mem ekaŭdis pri *Ruslanda Esperantisto* kaj *La Ondo* meze de la 1990-aj jaroj, kiam mi profundiĝis en la movadon kaj ekaktivis tie. Tiam mi estis tre juna kaj opiniis ambaŭ eldonaĵojn tre enuigaj. Poste mi ekkonis riproĉojn je la adreso de ties eldonantoj. Poste ni kunlaboris. Poste ni konfliktis. Poste ni denove kunlaboris. Poste ni parte amikis kaj tio daŭras – nu, almenaŭ mi tiel esperas.

Sed intertempe la geredaktoroj daŭre ĉiumonate preparis novan numeron de *La Ondo* sur same profesia nivelo.

Mi (kaj ne nur mi) malŝategas la obstine uzatan en *La Ondo* vorton "Ruslando" kiel nomon por la lando, kie mi naskiĝis kaj vivis ĝis certa aĝo. Mi ne ŝatis, ke Korĵenkov kaj Gorecka ne atentis la fortegan junularan Esperanto-movadon en Rusio el la 1990-aj. Mi krome ne ŝatis tion kaj jenon, sed tio estas ja ilia privata vidpunkto, je kiu ili rajtis, kaj tio havas neniun rilaton al la kolosa laboro, kiun faris kaj ĝis nun faras la geeldonantoj.

Multo ŝanĝiĝis intertempe, Korĵenkov kaj Gorecka spertis translokiĝon el la urala Jekaterinburg en la baltmaran Kaliningradon, postvivis gravan malsanon de Halina Gorecka (kun feliĉa fino) kaj sendube multon alian, kion la ekstera publiko ne scias.

Sed... intertempe la geredaktoroj daŭre ĉiumonate preparis novan numeron de *La Ondo* sur same profesia nivelo.

Nur tiu, kiu mem redaktas aŭ eldonas ion povas vere kompreni la amplekson de tia laboro. Mi estas ĝuste tiu, kiu laŭ propra sperto tion komprenas. Kaj admiras.

Sen *La Ondo* ne nur la rusia Esperanto-movado, sed ankaŭ (aŭ eble eĉ unuavice) la internacia iĝos malpli riĉa. Periodaĵoj regule malaperas, ĉiam pro malsamaj kialoj, sed ĉiam kun la sama sekvo: anstataŭ ili venas nenio. Ni deziru al Korĵenkov kaj Gorecka fortan sanon por realigado de aliaj planoj – je la fino de artikolo tio sonas iom banale, sed des pli vere.

Grigorij Arosev

Laŭ *Libera Folio* <https://www.liberafolio.org/2019/10/02/la-ondo-de-esperanto-foriras/>

Roterdamo perdas fidelan voĉtubon

En 2020 ne plu ekzistos la periodaĵo “La Ondo de Esperanto”. Ĝi jam mortis antaŭ ne longe kiel papera revuo pro poŝtaj kostoj kaj malkomfortaj veturadoj, ĝi definitive forpasas eĉ kiel retgazeto pro “la malboniĝo de la vidkapablo de la redaktoro”, s-ro Aleksander Korĵenkov. Tio signifus ke la eldonejo (Sezonoj) tute ne serĉis aŭ trovis anstataŭanton, kaj eĉ ne klopodis produktadi pli maloftan aŭ magran periodaĵon. Unufraze: ges-roj Korĵenkov-Gorecka ne havis efektivan redakcion ĉirkaŭ si.

Ne temas pri la unua (aŭ dua) ĉeso de LOdE, sed pri la tria. Ĝi malaperis en 1917, inter la marta kaj la oktobra revolucioj, estinte la sola kultura revuo en esperanto ne mortigita de la unua mondmilito. Ĝi resurektis en 1991, (preskaŭ) koincide kun la fino de Sovetunio. Kun kiu historia evento koincidas la nuna forpaso?

Eble kun la situacio de la Universala Asocio, al kiu LOdE kondukis tre fidele dum la lastaj du jardekoj: ja Korĵenkov mem estis ĝia B-komitatano, kaj la rotterdamo libroservo grociste aĉetis la (efektive valorajn) eldonaĵojn de Sezonoj. Nek postuleblan fidelecon nek atendeblan lojalecon LOdE havis por aliaj subjektoj en Esperantio: eĉ male.

Sezonoj “plu okupiĝos pri la libroeldonado, reta informado, podkastado, verkado, tradukado, recenzado, esplorado, prelegado, bibliografiado k. a.”; kvankam supozeble ankaŭ tiuj aktivecoj bezonas la uzon de okuloj, ne malpli ol la redaktado de gazeto. Bondeziron ĉiukaze.

Laŭ HeKo 719 1-A, 1 okt 19 <https://www.esperantio.net/index.php?id=3906>

Ĝi estas demonstra versio de la 82-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



La 15an de decembro okazos multaj kunvenoj kaj renkontiĝoj omaĝe al la naskiĝdatreveno de Zamenhof. Partoprenu kaj poste sendu prian artikoleon (kaj fotojn) al *La Ondo*.

Jubileoj kaj memordatoj en decembro 2019

2. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Humphrey Tonkin** (1939-1954-), brita k usona filologo, prezidanto de TEJO (1969-71) k de UEA (1974-80, 1986-89), reprezentanto de UEA ĉe UN en Novjorko, kunfondinto k nuna prezidanto de ESF (1968), la unua redaktoro de *Kontakto* (1963-66), (ĉef)redaktoro de *Language Problems and Language Planning* (1984-2013), aŭtoro de *Lingvo kaj popolo* (2006) k de aliaj libr(et)oj en/pri Eo. Tonkin tradukis en Eon du librojn de Ŝekspiro (*Henriko Kvina*, 2003; *La vintra fabelo*, 2006) k tradukis el Eo en la anglan du verkojn de T. Soros (*Maskerado*, 2000; *Modernaj Robinzonoj*, 2010) k la verkon de U. Lins *La danĝera lingvo* (2016-17). Membro de AdE (1983-), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1995), Honora prezidanto de TEJO (1971). – Legu pli en NDK, p. 282-285.

10. Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Heinrich August Luyken** (1864-1904-1947), germania k brita komercisto; sekretario (1922-26) k prezidanto (1926-28) de KELL; aŭtoro de kvar E-romanoj: *Paŭlo Debenham* (1912), *Mirinda amo* (1913), *Stranga heredaĵo* (1922), *Pro lŝtar* (1924). – Legu pli en NDK, p. 183-184.

15. Antaŭ 160 jaroj naskiĝis **Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof** (1859-1887-1917), ruslanda juda okulkuracisto; aŭtoro de la unua lernolibro de Eo (1887) k de aliaj lerniloj, tradukinto de pluraj beletraĵoj k de la Malnova Testamento, redaktoro de la unua E-gazeto (*La Esperantisto* (1889-95), fondinto de la religia-etika doktrino homaranismo, nomita de siaj samtempaj e-istoj “La Majstro”. Lia poemo *La Espero* estas la himno de Eo. – Legu pli en NDK, p. 304-306.

15. Antaŭ 90 jaroj mortis **Marie Hankel** (1844-1905-1929), germana e-istino, ofte nomata “la unua E-verkistino”; kunfondinto k la unua prezidanto (1911) de Ea Literatura Asocio k redaktoro de ties bulteno, reĝino de la Internaciaj Floraj Ludoj (5a UK, Barcelono, 1909), aŭtorino de *Sableroj* (1911). – Legu pli en NDK, p. 123-124.

15. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis **Sergio Pokrovskij** (1949-1980-), ruslanda komputikisto; konstanta kunlaboranto de *La Ondo de Eo*, *Ruslanda E-isto* k *Monato*; membro de AdE (1995-), direktoro de la Akademias sekcioj “Faka lingvo” (2014-15) k “Gramatiko” (2015-); aŭtoro de *Komputika leksikono* (1995) k *Lingvaj respondoj* (1999), tradukinto de *La majstro kaj Margarita* de Miĥail Bulgakov (1991); laŭreato de OSIEK-premio (2008).

17. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Ferdinand Eisen** (1914-1932-2000), estona pedagogo k filozofo, ministro de klerigo de Estonia SSR (1960-80); enkondukinto de Eo kiel fakultativa studobjekto en estoniaj lernejoj; prezidanto de Estonia Filio de ASE (1980-88) k de EAE (1988-91), honora membro de EAE (1992).

21. Antaŭ 150 jaroj naskiĝis **Louis Bastien** (1869-1902-1961), franca armeano, generalo; prezidanto de UEA (1934-36), post la skismo en 1936 prezidanto de IEL (1936-47), aŭtoro de *Naŭlingva etimologia leksikono de la lingvo Esperanto* (1907), *Vocabulaire de poche français-Esperanto* (1932) k *Militista vortareto* (1955). Membro de LK (1909-48) k AdE (1934-57), Honora Prezidanto de UEA (1947-61). – Legu pli en NDK, p. 28-29.

Aleksander Korjenkov

Lingvo



Danke al malavara financado, IALA ĝuis kunlaboron de konataj sciencistoj (Otto Jespersen, André Martinet, William Edward Collinson, Edward Sapir, Pierre Bovet k. m. a.) kaj de aŭtoroj/adeptoj de kelkaj planlingvoj. Post pluraj lingvistikaj esploroj, lernejoj, eksperimentoj, konferencoj kaj eldonaĵoj estis kolektive kreita Interlingua. Konatiĝu kun la dua parto de la historio de IALA kaj Interlingua en la sekvaj paĝoj.

IALA kaj Interlingua (2)

Ni publikigas la finon de la 13a ĉapitro el la universitata lernolibro *Interlingvistiko – enkonduko en la sciencan pri planlingvoj* de Věra Barandovská-Frank, verkita surbaze de la kurso, kiun ŝi instruas en la Interlingvistikaj Studoj ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznano. La komenco de la ĉapitro aperis en la oktobra *Ondo*.



13.7. Uzado kaj lingvokomunumo

En 1953 eklaboris, sub gvido de A. Gode, la posteulo de IALA, Interlingua Division de “Science Service” (usona instituto por popularigo de sciencoj, 1921-1966). Ĝia celo estis: (1) helpe de siaj tradukaj servoj enkonduki uzadon de Interlingua en internacie gravajn sciencajn publikaĵojn, ĉu kiel resumojn de artikoloj verkitaj en etnolingvoj, ĉu kiel originalan lingvon de artikoloj kaj disertaĵoj. (2) Faciligiti kontaktojn inter sciencistoj en diversaj landoj, interŝanĝi informojn, popularigiti sciencajn faktojn, aranĝiti kursojn por sciencistoj, kiuj volas publikigiti aŭ kongresi.

La uzado devis helpi ankaŭ eldonado de la periodaĵo *Scientia International*. La uzo de Interlingua precipe kiel internacia helpilo por sciencistoj estis la ĉefa celo de Alexander Gode, kiu konscie transprenis tiun ĉi ideon de Giuseppe Peano kaj Latino sine flexione, kune kun la nomo Interlingua. En la kvindekaj jaroj trideko da fakaj revuoj, ĉefe medicinaj, publikigis resumojn de siaj artikoloj en Interlingua (<http://www.interlingua.com/historia/publicaciones/summarios.htm>). Dum deko da sciencaj kongresoj, unue en 1954 en la monda kongreso por kardiologio en Vaŝingtono, aperis resumoj de la prelegoj ankaŭ en Interlingua. La posteulo de Interlingua Division, Interlingua Institute, atingis sukceson en scienca publikado i.a. per traduko de verkoj pri plantopatologio en *Multilingual Compendium of Plant Diseases* por la usona ministerio de agrikulturo (1976).



Komplete en Interlingua publikiĝis monata fakrevuo *Spectroscopia Molecular* (1952-1979) sub la redaktado de Forrest F. Cleveland, profesoro pri fiziko ĉe la Teknika Instituto en Ilinojso. Lia celo estis liveri al specialistoj pri spektroskopio almenaŭ superrigarde informojn, kiujn ili devintus serĉi en diverslingvaj revuoj kaj libroj. La revuo publikigis fakajn novaĵojn, resumojn de libroj, raportojn el konferencoj, recenzojn, kalendaron de fakaj eventoj kaj priskribojn de novaj instrumentoj pri spektroskopio, foje kompletajn artikolojn pri aktualaĵaj esploroj. Ĝin abonis individuaj fakuloj, ŝtataj kaj universitataj bibliotekoj kaj esploraj institutoj kun abonantoj en sume

29 landoj. Dum 27 jaroj de sia ekzisto *Spectroscopia Molecular* publikigis ĉ. 1650 paĝojn da sciencaj tekstoj. Laŭ spertoj de la redaktoro, oni kapablis senpere kompreni 80% de la enhavo, kaj pluraj legantoj kromlernis la bazojn de Interlingua por kompreni pli. Pri similaj spertoj kun interreta forumo en Interlingua <http://www.interlingua.com/conferentia/2001/quibesonio.htm> (ne plu trovebla en majo 2019) raportis Ingvar Stenström. Li konkludis, ke Interlingua povus esti lingva ŝlosilo al eŭropaj lingvoj por afrikanoj kaj azianoj.

Paralele kun uzado de Interlingua por sciencaj tekstoj formiĝis movado komparebla kun tiu de ekzemple Esperanto, Ido kaj Occidental, en kiu multe engaĝiĝis eksaj okcidentalistoj, esperantistoj kaj idistoj. La plej multaj Interlingua-aktivuloj troviĝas en Skandinavio, precipe en Svedio, kie jam en la kvindekaj jaroj fondiĝis kluboj. Interlingua estis instruata en kelkaj svedaj gimnazioj, anstataŭante la latinan en kursoj por internacia vortprovizo. La dua grava centro estis Svislando, kie aktivis i.a. eksa sekretario de Ido-Akademio Stefan Bakonyi, postlasinta al Interlingua fondaĵon por universala lingvo kaj libron *Civilisation e lingua universal*. Sviso Ric Berger eldonis buntajn enciklopediecajn verkojn, riĉe dokumentitajn (per leteroj, ĵurnalaj artikoloj ktp.), historion de Interlingua *Vade mecum de Interlingua* en 1967, *Le problema de una lingua international* en 1972 kaj ĝis 1983 la revuon *Revista de Interlingua*.

En 1955 li fondis kun André Schild (pliaj iniciatintoj estis Donald Hallows, Julien Toublet, Poul Moth kaj Ronald Spathaky) Union Mundial pro Interlingua (UMI), “un institution pro cooperation international concernant la lingua international Interlingua”. Ĝiaj sekcioj: *Ĝenerala* – por informoj kaj disvastigo de la lingvo, *Lingvistika* – por evoluigo de la lingvo, ellaboro de libroj kaj vortaroj, *Scienca* – por disvastigo en sciencaj publikaĵoj, *Literatura* – por tradukistoj kaj aŭtoroj de originalaj verkoj, *Filatelisma* – por kolektantoj. UMI havas delegitojn en dudeko da landoj de la mondo.


La unua prezidanto de UMI estis A. Gode, poste Leland B. Yeager, Jesper Olsson, Barbara Rubinstein, Alix Potet kaj ekde 2019 franca muzikologino Madeleine Mahé. Membroj de Consilio Executive estas Julian Mendez, Martijn Dekker, Alberto Mardegan, Michel Prim, Emerson José Silveira da Costa. Krome ekzistas dekmembra internacia Consilio General. Al honoraj membroj de UMI apartenis i.a. Jeanne Martinet (1920-2018), edzino de prof. André Martinet, kiu senlace aktivis en la movado.

Ĝi estas demonstra versio de la 82-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Ni komencas aperigi bibliografion de Esperantaj kaj priesperantaj artikoloj de Halina Gorecka. En la sekva numero aperos la dua parto en kiu estos registritaj ŝiaj verkoj, aperintaj en *La Ondo de Esperanto*. (La supra foto estis farita en la 40aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, okazintaj en Birŝtonas en julio 2004.)

Ĉu reveno al la tagordo?

La Sveda Akademio nun, post jaro de skandaloj, misfamigoj kaj suspektadoj opinias, ke ĝi purigis sin mem, solvis la problemojn kaj regajnis la iaman reputacion. (Legu pli pri la fono en *La Ondo de Esperanto*, 2018, №11).

Ja okazis ŝanĝoj: Horace Engdahl ne plu membras. Ankaŭ Katarina Frostenson demisiis. Ŝia edzo Jean-Claude Arnault estas ne nur akuzita, sed ankaŭ kondamnita perfortiganto. Frostenson publikigis kvazaŭan taglibron pri la skandalo, en kiu ŝi prezentas sin kaj sian edzon kiel viktimojn de ampleksa konspiro. La kritikisto Jens Liljestrand opiniis pri tiu publikaĵo, ke al ĝi mankas *baza deco*.

Kaj ankaŭ Sara Danius forlasis la Akademion kaj mortis en oktobro 2019 pro mamokancero. Do, ĉu ĉio en ordo, la tablo polurita kaj reveno al kutimaj aferoj?

En 2019 la Akadeno provis eĉ novan manieron por elekti la premion: kaj akademianoj kaj eksteraj spertuloj decidis pri la atribuo de la premio. Oni antaŭe atendis, ke ili elektu almenaŭ unu virinon por agnoski la aspekton *virinoj gravas*. Reveno al la kutimo estas – bedaŭrinde – ke ili tamen elektis du eŭropanojn, eĉ mezeŭropanojn: por 2018 Olga Tokarczuk el Pollando, kaj por 2019 Peter Handke el Aŭstrio.

Kaj Tokarczuk kaj Handke estas aprezataj verkistoj. Sed ankaŭ diskutataj. Ambaŭ pro eksterliteraturaj kialoj. Ambaŭ aktivas en malsamaj kampoj, tamen mi opinias, ke unu el ili absolute ne meritas la Nobel-premion.

Peter Handke – kulpuloj kaj viktimoj

En sia testamento Nobel decidis, ke la premio en lia nomo estu por tiuj, kiuj alportis la plej grandan utilon al la homaro. Handke ja estas konata kaj eĉ certagrade lerta verkisto kun propra kaj avida legantaro. Ili aprezas, ke li “helpe de lingva inventemo esploras randregionojn kaj la specifecon de homaj spertoj”, kiel diris la Akademio.

Ĝi estas demonstra versio de la 82-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Fiasko de imperio



Fabelo de Miĥail Korotkov

En la Granda Urbo sur Monto vivis libera homo kun la nomo Keneo. Laŭ sia kutimo li eliris iumatene sur la ĉefan placon. En tiu tempo gazetoj ankoraŭ ne ekzistis, oni elpensis ilin multe poste. Kaj tiam iri sur la ĉefan placon estis la nura maniero ekscii novaĵojn. Se vi sukcesos – vi vidos kaj aŭdos heroldon, kaj se ne – placaj gapemuloj rakontos ĉion al vi.

Sed en tiu mateno Keneo sukcese aŭdis heroldon. La heroldo venis senpere de la Imperiestro kaj proklamis:

– Hieraŭ estis konsiliĝo ĉe la Imperiestro mem. La kunvenintaj Grandaj Pastroj diskutis la demandon de la nombro de la loĝantaro. La Pastroj anoncis ke la nombro malaltiĝas. Kaj la kialo estas malaltiĝo de la *libido sexualis*. Tiu vortokombino sonis unuafoje, kaj la Pastroj klarigis al la plebo, ke tio simple estas la seksa volupto. Al Keneo tio estis ne multe pli komprenebla, ol la *libido sexualis*, tamen li konjektis, ke tio estas verŝajne simpatio kun virinoj.

En tiu tempo urbanoj jam elpensis “la amaran akvon” kaj ne simplan. La posedantoj de drinkejoj, por pli oftaj venoj de gastoj, el tiu ĉi amara kaj fiodora laŭ sia naturo likvaĵo per diversaj aldonoj faris plene allogan trinkaĵon. Kaj tial la urbanoj de la vira sekso anstataŭ amuzoj kun siaj edzinoj pasigis la tempon en drinkejoj.

Sed temas pri alio. La Grandaj Pastroj proklamis, ke estas neceso de seksa revolucio. Tio estas ke ekde ĉi tago ni devas plialtigi la ĉarmon de la virinoj. Kaj ni permesas al ili por komenco iradi nudabruste en termoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 82-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Bibliografio de Halina Gorecka

En ĉi tiu bibliografio estas listigitaj la verkoj de Halina Gorecka, kiuj aperis en “Ekzakte” (en 1982-83 “Informletero de Uralaj Esperantistoj”), “Sezonoj”, “Ruslanda Esperantisto” kaj “Spektro” – Sovetuniaj kaj Ruslandaj Esperanto-gazetoj, en kies redaktado kaj eldonado ŝi patroprenis. En la sekva kajero aperos ampleksa listo de ŝiaj verkoj, aperintaj en “La Ondo de Esperanto”.

Informletero de Uralaj Esperantistoj (ILdUE) / Ekzakte

1982

- Urala libro-servo // ILdUE, 1982, №2.
- [Biblioteko por aktivuloj] // ILdUE, 1982, №2.
- Urala Esperanto-arkivo // ILdUE, 1982, №2.
- Urala libro-servo // ILdUE, 1982, №3.
- Urala biblioteko // ILdUE, 1982, №3.

1983

- Urala libro-servo // ILdUE, 1983, №5.
- Urala biblioteko // ILdUE, 1983, №5.
- Niaj vojaĝoj kaj renkontiĝoj // ILdUE, 1983, №5. – [Virinfesta E-Renkontiĝo en Sverdlovsk].
- Rezulto de la tradukista konkurso de UEK // ILdUE, 1983, №6.
- Urala libro-servo // ILdUE, 1983, №6.
- Urala E-Biblioteko // ILdUE, 1983, №6.
- Budapeŝta Informilo aboneblas // ILdUE, 1983, №7.
- Urala libro-servo // ILdUE, 1983, №7.
- Belartaj konkursoj Liro-83 // ILdUE, 1983, №7.
- Donacoj // ILdUE, 1983, №8.
- Urala libro-servo // ILdUE, 1983, №8.
- Belartaj konkursoj Liro-83 // ILdUE, 1983, №8.
- Urala Esperanta arkivo // ILdUE, 1983, №9.
- Urala libro-servo // ILdUE, 1983, №9.
- Komputustoj atenton! // ILdUE, 1983, №9. – [Pri “Internacia Komputado”].
- Esperanto en Urala gazetaro // ILdUE, 1983, №9.

1984

- Bibliografia fako de Urala Esperanta arkivo // Ekzakte, 1984, №1.
- Fotofako // Ekzakte, 1984, №1.
- [La unua jaro de KEB] // Ekzakte, 1984, №1.
- Donacoj // Ekzakte, 1984, №1.
- Bibliografia fako de Urala Esperanta arkivo // Ekzakte, 1984, №2.
- Informoj el KEB // Ekzakte, 1984, №2.

Koran dankon! // Ekzakte, 1984, №2.

Kalendaro de Esperantaj rendezuoj en Uralo // Ekzakte, 1984, №3.

Nova libro el Tartu // Ekzakte, 1984, №4.

Studi kaj ripozi en Bulgario // Ekzakte, 1984, №4.

Эсперанто в уральской прессе // Ekzakte, 1984, №4.

Serĉatas "Hungara Vivo" // Ekzakte, 1984, №4.

1985

Mendu, dume estas havebla // Ekzakte, 1985, №1. – ["Budapeŝta Informilo"].

Bl plimultapreza // Ekzakte, 1985, №1.

Serĉatas loko por UER-8 // Ekzakte, 1985, №2.

Urala Libro-Servo // Ekzakte, 1985, №2.

13 EKoj en Uralo // Ekzakte, 1985, №2. – [E-klubo en Uralo].

Esperanto en la festivalo // Ekzakte, 1985, №3. – [12a Tutmonda festivalo de junularo kaj studentoj en Moskvo].

Interesaj libroj en ULS // Ekzakte, 1985, №3.

Legu la librojn de István Nemere! // Ekzakte, 1985, №4.

Esperanto en Uralo // Ekzakte, 1985, №5. – [Agado de UEK en 1985].

Kio pri la somero? // Ekzakte, 1985, №5.

1986

Kio nova en KEB? // Ekzakte, 1986, №1.

Urala Esperanta Arkivo // Ekzakte, 1986, №1.

Urala Libro-Servo // Ekzakte, 1986, №1.

Mil uralaj anekdotoj // Ekzakte, 1986, №5. – [Renkontiĝo kun F. Vibe en la 4a Esperanta Semajno, Sverdlovsk].

El sub plumo de Gazizi // Ekzakte, 1986, №5. – [Pri "Zigzage" de Gafur Gazizi].

Urala Adresaro // Ekzakte, 1986, №6. – [Adresoj de 18 E-klubo kaj rondetoj, aktivuloj en senklubaj urboj; kun komentario].

Du novaj kluboj // Ekzakte, 1986, №6. – [E-klubo en Niĵnij Tagil kaj Revda].

Zamenhof-festo // Ekzakte, 1986, №6. – [Sverdlovsk, decembro 1986].

Uralaj toponimoj, aŭ transskribo de geografiaj nomoj // Ekzakte, 1986, №6.

1987

Antaŭ la jubileo // Ekzakte, 1987, №1. – [Esperanto en Uralo en 1986].

Bibliografia fako de UralEA // Ekzakte, 1987, №1.

Aĉetu unikan libron de Zamenhof // Ekzakte, 1987, №3. – ["Plena rusa-internacia vortaro, 1910].

Ĝi estas demonstra versio de la 82-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



**Ni kore dankas al Ramón Perera, Marta Moliné kaj Xavi
Alcalde, kiuj helpis nin plani kaj realigi nian vojaĝon al
Barcelono kaj la restadon en la ĉefurbo de Katalunio komence
de novembro ĉi-jara!**

Halina kaj Aleksander

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Figefika sangofluo

Figoj <...> enhavas fikinon, kiu fluas sangon, reduktante ĝian coagulabilidad. (*Sekigitaj figoj - utilaj proprajoj*, <https://eo.tierient.com/sekigitaj-figoj-utilaj-proprajoj>)

Ne penisulo

La pensulo vidis malsamajn doktrinojn kiel aspektojn de ununura Vero. Li apogis la disvolviĝon de ĝenerala filozofia kaj religia kontemplado de la mondo, komencita de Fikino. (<https://eo.birmiss.com/la-humanismo-de-la-filozofio-de-pico-della-mirandola/>)

Energia ŝanĝo

En 1871 estis enkonduktita diferenco inter la gimnazioj klasika kaj reala. (Aleksander Korĵenkov: *Homarano*, Kaliningrado: Sezonoj, 2009, p. 38)

Ne forkuris de dolaroj

Sesamo Strato/Internacia Fuĝanta Organizo ricevis 100.000.000 de dolaroj produkti programojn/lernejojn por, unuavice, siriaj fuĝantoj. (Neil Blonstein, <https://www.facebook.com/groups/diskuto/permalink/2741994902520686>)

En golfo, sen so-sono

...efeboj (ĵus plenkrekitaj junuloj)... (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Panatenajoj>)

Doktr-ine, aŭ: Alta tekso al spiritoj

tri kvaronoj de la islanda popolo... estas spiritistoj aŭ havas inlinon al tiu doktrino. (Edwin de Kock: *La lingvo serena*, p. 83)

Pli ol nun nunas nur' la nun'

Edwin de Kock utiligas pli sobrajn ritmojn en la nuna libro ol en sia nuna... (Edwin de Kock: *La lingvo serena*, p. 601.)

Malcerta pozicio

Mi tie longe staris sidiĝanta sur tabulo fiksita en la embrazuro. (Edwin de Kock: *La lingvo serena*, p. 26.)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnický@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 82-paĝa novembro Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>